# Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Januaro 2004 MENSUEL/MONATA 75-a jaro, n-ro 1 (1183)

**Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem**

ISSN 1163.0442 5 €

**http://www.sat-esperanto.org/ *** retadreso: satesper@noos.fr**




*La organo de nia fratorganizo "SAT-Amikaro" ŝanĝis la nomon kaj aspekton.*

*Ĝi nomiĝas "La SAGO" (SatAmikara GazetO).*

*Longan vivon kaj sukceson al "La SAGO"*

**SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI**

## El la redaktejo...



*Karaj,,*
*vi tenas en la manoj la unuan numeron de la serio 2004. Mi esperas ke vi trovos en ĝi interesajn kaj instruajn artikolojn. Por ke ĝi estu ankoraŭ pli interesa, plian fojon mi invitas vin al kunlaboro. Sendu al la redakcio viajn artikolojn.*
*Ĉi-foje la kotiztabelo aperas malfrue, nur en tiu ĉi numero, kaj pro kio preskaŭ neniu el vi jam pagis la kotizon 2004. Vi povas konstati ke la kotizoj restis senŝanĝaj, kiel lastjare, sed la Asocio bezonas tiun monon por povi normale funkcii. Do pro tio, ne atendu sed pagu tuj. Samtempe vi povas sendi vian kongresaliĝon, ĉar la plej favora periodo finiĝas fine de januaro.*
*Esperante ke tiuj miaj kelkaj vortoj ne estos vanaj kaj senrezultaj, mi sincere salutas vin ĉiujn.*
*Via Redaktoro*

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesper@noos.fr.
TTT-paĝoj:
http://www.sat-esperanto.org
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
*
Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques SCHRAM
Abonnement annuel/jara abono France 55, Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
Commission Paritaire n° AS-74399
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

SATEB
Sennacieca Asocio Tutmonda En Britio

### JARKONFERENCO 2004 DE SATEB
### 16-18.05.2004
### ĉe Barlaston vilaĝo

Kreŝimir Barkoviĉ, Ĝenerala sekretario de la SAT-PK, estos nia gastpreleganto en 2004. Li gajnis "OSIEK-Premion 2002" pro sia tradukaĵo de "7000 tagoj en Siberio" - la temo de unu el liaj du prelegoj. La alia estos "Tri semajnoj en Japanio - sur la spuroj de Lanti".
Por pli bone povi partopreni la diskuton, bonvolu antaŭe legi la libron. La semajnferio estos varia kaj stimula.
Por pliaj detaloj kaj aliĝilo, kontaktu:
Wedgwood Memorial College
Barlaston
Stoke on Trent
Staffs, ST12 9DG
Tel: 01782-372-105/01782-373-4278 rete: wedgwood.college@staffordshire.gov.uk
Se vi ne bone regas la anglan, kontaktu Anne aŭ Ron (vidu ĉi-sube. Ili estas esperantistoj).

Paralele estos Esperanto-Konversacia grupo por komencantoj - gvidata en la angla. Por pliaj informoj, nur pri tio, kontaktu:
Anne Johnson, 42 Beresford Road, London N5 2HZ, Britio, rete: a.johnson@amserve.net
aŭ Ron Lynn, rete: ronsnafulin@aol.com.
Al unu reprezentanto de ĉiu SAT-LEA-o, SATEB ofertas senpagan restadon nur dum la semajnfino. Pri tio kontaktu Anne aŭ Ron kiel supre.

*KOREKTO*
*Nia kamarado Marteno Bustin atentigas, ke li mem ne estas aŭtoro de la artikolo "Denove la religio" aperinta en novembra Sennaciulo, sed ke li tradukis ĝin el la hispana anarkosindikatista ĵurnalo CNT.*
*La redakcio*

*PAGU VIAN SAT-KOTIZON 2004 !*
*KOTIZTABELO - EN LA LASTA PAĜO*

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ

Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (ĉ = ĉ, ŝ=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon. La Redakcio

# Novjara mesaĝo de la prezidanto de la P.K. de SAT



Karaj gekamaradoj,

unue mi volas deziri al vi, ĉion bonan por la jaro 2004. Sanon kaj feliĉon por vi kaj viaj familianoj kaj amikoj, kaj kuraĝon en viaj bataloj kiuj celas pli socialan kaj humanan mondon.

Antaŭ 125 jaroj naskiĝis en la Franca vilaĝo Néhou, Eugène, Aristide, Alfred Adam. Poste li famiĝos sub la nomo Eŭgeno Lanti, unu el la ĉeffondintoj de nia asocio SAT (el Vivo de Lanti, E.Borsboom).

Tiuj, kiuj konas la historion de lia vivo scias, ke unu aferon Lanti certe neniam volis, kaj tio estas ke homoj ornamu lin per gloro kaj metu lin en lumĵetilon. Plej granda respekto kiun ni povas fari por "festi" la rememoron de la naskiĝtago de Lanti, estas silenti pri la homo, kaj mi faras tion.

Tamen la ideoj de ĉi tiu genia persono iĝis vole ne vole posedaĵo de grandega grupo da homoj kiuj dum la lastaj 83 jaroj aktivis en SAT. Homoj kiuj batalis por ke el la mondo malaperu maljusto, subpremo kaj malegaleco. Homoj kiuj konscie vivas kaj kiuj sopiras al egalrajto por ĉiuj homoj el la tuta mondo.

Kun siaj kompanoj de la unua horo Lanti kreis asocion kiu estis tiel avangarda ke eĉ nun, precipe reakciuloj, ne kapablas kompreni la celojn de nia asocio.

Malgraŭ la multaj tekstoj kiujn Lanti postlasis, en kiuj li klare klarigis "Kio estas SAT", eĉ nun homoj ne komprenas, ke SAT ne estas Esperanto-asocio. SAT estas NRO kies celo estas eduki homojn, subteni ilin en ilia batalo kontraŭ maljusto, helpi ilin kompreni ke dogmoj ne alportas feliĉon, sed male katenigas homojn, subpremas ilin serve al tiu, kiu estas la plej granda malamiko de la salajruloj, de la laboranta klaso, nome la liberala kapitalismo.

SAT ne estas asocio kiu postkuras politikajn partiojn aŭ politikistojn, sed asocio kiu havas propran gvidlinion. Ĉi tiun informon oni tre facile povas trovi en malgrandega libreto, nur 28 paĝa, la statuto de SAT. Jes vi pravas, por kompreni ĝin oni devas esti sufiĉe sperta uzanto de la laborlingvo uzata de SAT, la universala lingvo Esperanto.

Esperanto fakte estas unu el la simboloj de SAT. Per uzado de Esperanto, SAT montras ke ĝi ne lasas sin katenigi, eĉ de la plej grandaj mondaj fortoj.

Lingva rajto estas parto de homa rajto, estas signifa parto de klasbatalo. SAT ne ligas lingvon al iu kulturo aŭ lando. SAT ankaŭ ne pensas en limigoj de landlimoj, sed estas sendependa de iu ajn nacio, sendependa de iu ajn nacia lingvo, sendependa de iu ajn premgrupo, politika partio aŭ dogmo.

SAT fosas sian propran sulkon. Tio ne signifas ke ni estu indiferentaj al la laboro de aliaj asocioj kiuj celas la samon kiel ni. Ni ankaŭ volas kunlabori kun ili, kiam ili respektas nian sendependecon.

Kion ni devas fari honore al nia k-do Lanti? Mi ne volas doni al vi konsilojn, sed mi povas diri kion mi klopodas fari: Agadi laŭ la idearo de Lanti kiu laŭ mia opinio estas konstate serĉi la veron, kompari miajn ideojn kun aliaj. Ne fali en kaptilon de grupoj kiuj disvastigas dogmojn kaj mensogojn.

Mi ankaŭ volas fari ĉion por konvinki aliajn aliĝi al SAT, ĉar ju pli da homoj, des pli da ideoj. Kompari ideojn estas grava, sed ankaŭ elekti kaj prijuĝi la ideojn de aliaj estas tre grava.

Mi volas alvoki vin al plej larĝa formo de toleremo, sed samtempe volas atentigi vin; toleremo devas halti je la ĝusta flanko de la gaskamero. Per ĝi mi volas diri ke demagogojn kiuj propagandas disigon de laboristoj pro koloro aŭ deveno, kiuj klopodas malpermesi liberan eniron en landoj aŭ kontinentoj, rasistojn kaj ksenofobojn, ni ekde la unua momento malfidu kaj kontraŭbatalu.

Ni ĉiuj devas havi la rajton vivi en paco, Ni devas fari ĉion por kompreni la problemojn de aliaj, subteni la malfortojn kaj atentigi la profitemulojn pri ilia erara konduto.

Sur la stratoj ĉie en la mondo povas nun eksplodi bomboj. Atenco de fanatikuloj kontraŭ senkulpaj civitoj iĝis preskaŭ normala bildo en nia hodiaŭa mondo. Ni kondamnu per niaj plenaj fortoj ĉi tiujn atencojn, sed ankaŭ kaj precipe la kaŭzon de ili. La tro ofta kialo, ke politika sistemo kreis tavolon de maltoleremo kaj malamikeco inter najbaroj, inter amikoj. Ke landlimoj iĝas pli gravaj ol la sorto de la homoj kiuj vivas inter ĉi tiuj limoj. Ke Ni iĝas pli grava ol la mondo kie ni vivas. Mondo ne konsista ne nur el Ni sed el Ni ĉiuj. Neniam, iu popolgrupo superas alian.

Nekalkuleblajn multajn membrojn SAT bezonas, por fari eĉ la plej urĝajn laborojn, por plenumi nian taskon. Ni devas konvinki ĉiujn homojn ke alia mondo eblas. Mondo en kiu ĉiuj homoj vivas feliĉaj, pace kaj amike.

Ĉiuj homoj kiuj volas, povas malkovri ke la onidiroj kaj mensogoj, ke SAT estas unutendenca asocio baziĝas sur nur rakontetoj de stultuloj kaj eĉ malamikoj de nia asocio, kiuj ne volas fari la penon legi la vortojn de Lanti. Ili ne volas analizi kion li skribis, eble ili timas ke, se SAT atingus sian celon, la tempo de la subpremantoj, demagogoj, diktatoroj ktp estos for por eterne.

Konvinku amikon pri la grava valoro de SAT, varbu kaj helpu pligrandigi nian rondon.

SAT- membroj estas unue batalontoj, kiuj postulas respekton por la homaj rajtoj, respekton por la sorto de la laboranta klaso kaj salajruloj kaj nur poste kiam nia sociala laboro finiĝos, esperanto.

Vivu SAT!

Jakvo SCHRAM